



# ISRAELI ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO

Tel Avivo  
Postkesto 39004

N-ro 61. Julio 1977

האספרנטו סט ישראל

כטאון הלינה לאספרנטו בישראל

תל - אביב - ת.ד. 39004

חברת 61 - יולי 1977

תערוז אלכסנדר מנור

# ISRAELIA ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO-LIGO  
EN ISRAELO

Tel Avivo  
Poŝtkesto 39004

N-ro 61. Julio 1977.

Ĉefredaktoro:

Aleksander Manor

en la redakta komitato:

Josef Šemer

## LA NAŬDEKA JUBILEO DE LA INTERNACIA LINGVO E S P E R A N T O

En Junio 1887, antaŭ 90 jaroj, d-ro Zamenhof publikigis la unuan Esperanto-libron en la rusa lingvo. Tiu ĉi unua E-libro enhavis gramatikon, vortaron kun 927 radikoj, fragmentojn el Biblio, versaĵojn kaj "promesojn" lerni la lingvon internacian, se la saman deziron esprimos dek miliono da personoj. Tiun promeson subskribitan de la leganto oni devis sendi al la aŭtoro. Z. subskribis la lernolibron per pseŭdonimo: "D-ro Esperanto".

Sur la dua paĝo de la "Unua Libro" troviĝis la noto de Z: "Lingvo Internacia", kiel ĉiu nacia estas komuna propraĵo; la aŭtoro forlasas por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn al ĝi".

Z. mem poste citis la titolon de tiu ĉi libro jenmaniere: "Lingvo Internacia". Antaŭparolo kaj plena lernolibro".

En la antaŭparolo li skribis interalie: "La nun proponatan broŝuron la leganto kredeble prenos en la manojn kun malkonfido, kun antaŭe preta penso, ke al li estas proponata ia nefektiviĝebla utopio; mi devas tial antaŭ ĉio peti la leganton, ke li formetu tiun antaŭjuĝon kaj ke li pripensu serioze kaj kritike la proponatan aferon" -- (daŭrigo-p. 24)



### ESPERANTO NAŬDEKJARA

En la jaro 1887 aperis la unua lernolibro de Esperanto. Do ĝi estas la naskiĝjaro de la lingvo kaj nun estas ĝia naŭdekjara datreveno. La lingvo havis periodojn de rapida kaj malrapida kreskado. Pro Zamenhof certe supozis pli rapidan evoluon de la lingvo. Aliaj ideoj de la fino de 19-a jarcento entuziasmis milionojn de homoj kaj ŝanĝis dum la sekvintaj jaroj la mondkarton. Kompare kun tio la evoluo de E. estis tre modesta, tre malrapida. Kial? La ideo de E-ismo estas ja tiel nobla kaj grave, tiel logika. La respondo al tiu demando troviĝos eble en la estonteco. En diagnozo troviĝos la prognozo.

La 19-a jarcento estis la tempo de la pligrandiĝo de la naciismo kaj de la ŝovinismo. Kun la naciismo kreskas la zorgo pri la nacia lingvo.

Tra multaj centjaroj havis Eŭropo ĝian internacian lingvon - latinan. En la tempo de la naskiĝo de Esperanto la latina lingvo cedis pli kal pli. Oni ne plu uzas la latinan por la scienca literaturo. Nuntempe la latina estas preskaŭ forigita de ĝiaj kutimaj fakoj, kiel medicino kaj farmacio. La tempo de naskiĝo de E. ne estis matura por ĝi. En la naskiĝurbo de Z. Bjalistok kunvivis ne en granda amikeco diversaj popoloj. Tio ebligis ideon de internacia lingvo, sed la politikaj kaj kulturaj kondiĉoj ne helpis al ĝia evoluo. Kial?

Rusio estis kaj estas multpopola imperio kaj la rusa lingvo - la dua lingvo de la nerusaj popoloj. La anoj de diversaj popoloj parolis en Bjalistok unu kun alia ruse. Poste apartenis Bjalistok al Pollando kaj la pola lingvo anstataŭis la rusan.

Ĝuste en la multpopolaj imperioj oni sentas la neceson de la internacia lingvo, sed la politika klimato ĝenas ĝian kreskadon. E. konkurencas kun la rusa lingvo kaj tio eble estas la kaŭzo, ke Stalin persekutis E-istojn. E. estis danĝera por la rusa lingvo, kiu estas necesa por la dominado de la rusa popolo.

En la unuopopolaj ŝtatoj de Eŭropo la ondo de naciismo malhelpis al E. Tia estis la situacio ĝis la mezo de la 20-a jarcento. Nun ŝanĝiĝis la cirkonstancoj. Neniam ekzistis tiel favora situacio por E. kiel nun. Estas kvar favoraj kaŭzoj por tio: 1. La proceso de malkoloniado, 2. La ekonomia kaj la politika kunlaboro de diversaj ŝtatoj en okcidenta Eŭropo, 3. La konstanta plialtiĝo de la vivnivelo, 4. Iom da liberalismo en Sovetio.

1. Granda parto de la liberigitaj ŝtatoj havas tre grandajn lingvoproblemojn. Ili estas konglomeratoj de multaj popoloj kaj triboj. Kies lingvo devas esti la ŝtata lingvo? Tio estas tre grava problemo, ĉar kies lingvo, kies dominiĝo, krome oni bezonas modernan lingvon taŭgan por la scienco kaj la politika vivo. Tio klarigas kiel postresistas la franca kaj angla lingvoj en la estintaj kolonioj. La fremdaj lingvoj signifas la kulturan dependecon. E. devas heredi la koloniajn lingvojn. Tion postulas la nacia fiereco.

2. En okcidenta Eŭropo okazas proceso de forviŝado de la interŝtataj limoj batalantaj dum jarcentoj. La interŝtata kunlaboro pligrandiĝas. La multo de naciaj lingvoj malhelpas. Neniu nacio rezignas sian lingvon kaj prave. Por kio rezigni? Tio humiligas. La sola solvo estas la internacia lingvo. Per E. al frateco de la popoloj.

3. La plialtiĝo de la vivnivelo alportas turismon de amasoj da homoj. Miliono da homoj vojaĝas tra la mondo kaj renkontas barilojn ne militajn sed lingvajn. La internacia lingvo solvus problemon dum la vojaĝoj, de la hoteloj, jumularaj tendaroj. La junularo emas akcepti ideojn de paco kaj interkompreniĝo. E. proksimigas la popolojn.

4. Hodiaŭ ŝanĝiĝis iomete la cirkonstancoj en Sovetio. La reĝimo estas iom pli liberala. Multaj homoj levigas siajn kapojn. La naciismo kreskas nun en Ukrainio, en la baltaj landoj kaj en satelitaj ŝtatoj. La popoloj sentas sin en duobla dependeco: politike kaj kultura. La kulturandependecon simbolas la rusa lingvo instruata en ĉiuj lernejoj de la sovetia imperio. E. donas senton de libereco almenaŭ kulture. Krome E. povas servi kiel helpilino inter la diversaj komunistaj partioj. Ankaŭ ili sentas bezonon de E.

La ĉefa malamiko kaj danĝero por E. estas malklereco, speciale malklereco de la junuloj. Strange... Israela oficistino demandita ĉe strato Zamenhof "kiu estas Zamenhof" respondis: "unu de la unuaj tel-avivanoj"...

Iser Levin



Renkontiĝis kaj konversaciis kun la Majstro (1916) kaj sub lia influo e-igis en (1920). Estis kunfondinto de PEL ("Palestina Esp.-Ligo"), redaktis ties priodaĵojn (1943-1947) kaj prezidis ĝin. Kunlaboris en "Heroldo de Espelauto" (1947-1949), en "Malgranda Revuo" (1947-1953), en "Biblia Revuo" (1971--1973) kaj en aliaj periodaĵoj. Verkis hebrean Esperanto-lermolibreton (1942), "Hebrean Kantareton" (1941), poemon "Tiberio" (60 paĝoj; 1944) kaj biografion de Havkin (1976). Kunlaboras konstante en "Israela Esperantisto". Finpreparitajn manuskriptoj: "Israela Kantaro" (enhavas 40 elhebreigitajn kantojn kun muziko) kaj antologio de hebrea poezio (120 elektitaj poeziaĵoj de la hebreaĵ aŭtoroj, ek de la "ora periodo" en Hispanio ĝis al la plej elstaraj poetoj de nuntempo, en esperanta traduko).

PSALMO 126 (תהלים קכ"ו)... תשובה ציון 'ה תשוב

Dum traviv' de reven' al Cion!  
 Estis mi kvazaŭ revon songantoj,  
 Elverŝiĝis el kor' gaja son',  
 Per Di-laŭdaj jubiloj kaj kantoj.


Kaj aŭdiĝis en mond' onidir'  
 Inter tuta arego popolo:  
 -Estas ĝi granda far' ĝis admir',  
 Kiun povus nur Dia man' sola!

Kaj dum migro, mirakla vagsperto  
 Ekfariĝis por ni - evidento,  
 Kiel kur' de bruanta torento  
 En fluejo de suda dezerto.

Ĉiu, kiu plant'-semis  
 Kun fervoro kaj larmo,  
 Vidos fine la arbojn  
 De propra enplant',  
 Nur la hom' kiu ĝemis  
 Dum semado en farmo,  
 Fine ligos la garbojn  
 Kun rikolta ĝojkant'.

Libere trad. J. Kohen Cedek

La sciigapri la titoligo de nia kara s-ano J. Kohen Cedek donis I.E. en la 60-a numero sur la paĝo 23-a.



JOSEF KOHEN - CEDEK  
 "EMINENTULO DE JERUSALEMO"

Mia samideano Josef Kohen Cedek: poeto, muzikinstruisto, verkisto kaj edukisto, ricevis la titolon "Eminenta Urbano" pro sia laboro kaj verkoj.

La 15-an de Majo 1977 okazis en Jerusalemo solena ceremonio kun ĉeesto de la Ŝtatrezidento Prof. E. Kacir kaj la urbestro T. Kolek, dediĉita al titoligo de 12 civitanoj kiel "Eminentaj Urbanoj" por la jaro 1977.

La urbestro T. Kolek subtekis, ke iliaj kreaĵoj kaj atingiĝoj servas kiel ekzemplo por multaj aliaj.

J. Kohen Cedek nask. en 1904 en Vilno (nun: Vilnius, Litova S.S.R.) en tradicia cionista familio. Post la rusa gimnazio li finis hebrean pedagogian instituton, muzikan konservatorion kaj studis matematikon kaj arkeologion. Gvidis hebrean popollernejon en naskiĝ-distrikto. Enmigris Palestanon en j. 1925. Laboris kiel pioniro-ano de kibuco. Instruis en orfejo en valo Jizreel, en telaviva teknika altlernejo "Montefiore", gvidis popollernejon en Jerusalemo. Dum 27 jaroj instruis en tiea gimnazio, en kvartalo Reĥavia.

Li tradukis rakontojn de A. Puŝkin en hebrean lingvon, "Reineke-vulpo" de Goethe, du kolektojn da lirikaĵ versaĵoj de A. Klausner kaj verkis lernokrestomation. Kunlaboris en diversaj gazetoj kaj fakaj ĵurnaloj (kiel "Hed ha-ĥinuĥ", "Jeda-Am" en T.A., "taclil" en Hajfo). Iam ano de ECEL-rezistato, membro de ties kelkaj institucioj. Elektita kiel "Eminentulo Urbano" "עמילון" 1977.

H A T I K V A (La Espero).


(La himno de Israelo) Naftali H. Imber

Esperantigis J. Kohen-Cedek

Se en kor-interno  
de anim-sincer'  
ĝermas am-kerno  
al patruja ter',  
Al rand' orienta  
per sopir-magi'  
nin, sentimente  
tiras nostalg'i'.

Refreno:

La e s p e r o n e forperdos ni!  
Tra miljaroj de sufer' kaj prem' -  
ke ni, liberaj, vivos en uni',  
en land' Ciono, en Jerusalem'. (dufoje)



EFFRAIM KIŜON

Efraim Kiŝon naskiĝis en Budapeŝto - 1924. Antaŭ ol li venis al Israelo en 1949 li jam publikigis diversajn felietonojn.

Li lernis la hebrealan lingvon en "ulpano" (ulpan, hebrelingve, estas speciala kvin-sesmonata seminario, kie novemigrintoj lernas praktike uzi la hebrealan lingvon.) Li vivis unu jaron en kibuco Ejn-Haĥores.

Post du jaroj en Israelo li jam komencis skribi hebree, unue en la ĵurnalo por novemigrintoj "Omer" kaj en la jaro 1952 li jam skribis konstante en la ĵurnalo "Maariv". (La plej legata ĵurnalo en Israelo.)

Li publikigis ĝis nun pli ol tridek verkojn. La tradukoj de liaj verkoj aperis en 16 lingvoj. La plimulto de tiuj verkoj estas humuraĵoj kaj satiraj teatraĵoj. Li apartenas al la plej legataj satiristoj en la mondo.

Samideano Gerhard Ziegler tradukis multajn liajn satirojn. Ili estis publikitaj en "Eŭropa Esperanto-Revuo". La tradukoj distingiĝas per sia perfekteco. Ili estas faritaj de germana traduko. en seari-

proĉa Esperanto kaj redonas ĉiujn detalojn de la originalo.

S-ano Ziegler intencas eldoni ĉiujn tradukojn en unu libro. Ni esperas, ke li sukcesos, kaj lia verko troviĝos en ĉiu esperanta privata biblioteko.

Red.



LA AFERO KAIN & HABEL

Nur tre malofte okazas dum vojaĝoj, ke servomono ludas nenium rolon. Tial tia evento estas nepre menciinda.

LA MONDREKORDO PRI STULTECO

Por la mond-ĉampioneco pri stulteco sendube multaj kandidatoj povus enlistigi sin kun nepravaj venko-sancoj. Antaŭ nelonge mi volis doni la ĉampionecon kun pokalo al tiu cipra turist-gvidisto, kiu montrinte al mi pejzaĝajn belajojn de la insulo ne povis trovi la vojon hejmen kaj subite ekplorante kriis: "Sed hieraŭ mi ankoraŭ vidis ĝin, sinjoro. Mi ĵuras!" Poste israela trafik-polistico gajnis pli poentojn, kiam mi en Herclia okupigis pri pejzaĝo-scenoj por mia filmo "Calaŝ". "Kiel nomiĝas la filmo?" Li demandis. "Calaŝ", mi respondis. "Ĉu Salaŝ?" li pripense kaj kapsekue redemandis. "Tiun filmon mi ĝis nun ne vidis..." Sed eĉ tiun rekord-idio-tecon antaŭ nelonge alia homo superis. Hotel-pordisto en Barcelono elmontriĝis nesuperebla kaj per tio ĉampiono, merita posedanto de l' pokalo.

Mi altelefonis lin de mia ĉambro, kaj la interparolado en angla lingvo, kiun li tre fuŝparole aplikis, sinsekvis jene:

"Morgaŭ mi flugos Madridon", mi komencis. "Bonvolu rezervi hotelĉambrojn kun banejo por mi." "Vi atendi, mi vidi, sinjoro," la pordisto respondis demetante la aŭskultaparolilon. Post kelka tempo li denove ekĉirpis en la aŭskultilo: "Mi bedaŭri, sinjoro. Ni havas ne ĉambro libera. Vi provu venonta semajno." Tion li diris ne formetante la aŭskult-parolilon, sed finante la telefonadon kun mi.

Mi denove alvokis:

"Vi miskomprenis min. Mi bezonas ĉambrojn en Madrido, ne tie ĉi."

"Mi bedaŭro, sinjoro, pro via peno, ke vi refoje telefononi al Madrido. Ni ne havi ĉambro libera. Bonvolu provi sekventa semajno, sinjoro."

"Uno momento!" mi revokis en mia plej bona hispana, antaŭ ol li povis fini nian parol-kontaktton. "Mi ne troviĝas en Madrido. Mi bezonas ĉambro en Madrido."  
 "Certe, sinjoro. Sed tiu ĉi hotelo ne situas en Madrido. Tiu ĉi hotelo estas en Barcelono."



"Mi scias tion."  
 "Kial?"  
 "Ĉar mi loĝas tie ĉi."  
 "Vi loĝi, kie do?"  
 "Jes, tie ĉi, ĉe vi."  
 "Vi ne esti feliĉa pri via ĉambro, ĉu?"  
 "Mi estas tre feliĉa pri mia ĉi-tiea ĉambro, sed morgaŭ mi devas flugi Madridon."  
 "Ha, vi deziri, ke mi preni malsupren via pakajo, ĉu ne?"

"Jes, sed nur morgaŭ. Ne nun."  
 "Bone, sinjoro. Bonan nokton, sinjoro."  
 Refoje li finis la telefonan kontakton inter ni. Refoje mi retelefonis.  
 "Estas denove mi. La viro, kiu morgaŭ flugos Madridon. Mi vin petis rezervi ĉambro kun banejo por mi."  
 "Vi atendi, mi tuj ekzameni, sinjoro." La jam havigita paŭzo ripetiĝis. "Mi rigardis en libro. Kun granda bedaŭro, sinjoro. Kun tre granda bedaŭro, sinjoro; ĉiuj miaj ĉambroj jam okupitaj. Provu venonta."  
 "Mi ne volas ĉambro en tiu ĉi hotelo! Mi jam havas ĉambro! Bonvolu kompreni! Mi loĝas en numero 206!"  
 "Ĉu en 206? Momento, mi petas, sinjoro. Ne, mi bedaŭri. Ĉambro 206 estas jam okupita."  
 "Kompreneble, ĝi estas okupita de mi."  
 "Kaj vi deziri alian, ĉu ne?"  
 "Ne! Mi morgaŭ flugos Madridon. Kaj vi rezervu ĉambro por mi."  
 "Ĉu por morgaŭ?"  
 "Jes."  
 "Vi atendi. Mi tuj ekzameni . . . Ĉu kun banejo?"  
 "Jes."  
 "Vi esti feliĉa, sinjoro. Mi havi ĉambro por vi por morgaŭ."  
 "Dank' al Dio!"  
 "Morgaŭ ĉambro 206 esti libera."  
 "Dankon!"  
 "Neniel danki, sinjoro, ĉu vi plu deziri io alia, sinjoro?"  
 "Konjakon, mi petas."  
 "Ĝi tuj veni, sinjoro!"


Efraim Kiĝon

Tradukis: Gerhard Ziegler, FRG.  
 Postrimarko: Pri la lingvaj eraroj de la pordisto nek la aŭtoro nek la tradukinto responsas!

## AMKANTO

- Je aĝo dudek naŭa ankoraŭ vi allogas, pli ol la aliaj. Mi tute ne mensogas. Okuloj viaj fajraj varmigas kaj eĉ brogas. Je aĝo dudek naŭa ankoraŭ vi allogas.
- Nur lasttempe iomete vi kvazaŭ vin neglektas. Ne ridetas vi kokete, La buklojn plu ne plektas, matene en ĝardeno vi florojn ne kolektas lasttempe iomete vi kvazaŭ vin neglektas.
- Ĉu vi seniluziigis vi amatino kara? Aŭ eble jam laciĝis pro daŭra zorg' amara. Kial vi ne kantas, Kun akompan' gitara? Ĉu vi seniluziigis vi amatino kara?
- Leviĝu-do- kaj montru: Ne estas via legendo. Flirtas via flago espereplen', sen plendo. Salutu la najbarojn per amika manetendo, dum la dudek naŭa tag' de sendependado.

Didi Menusi  
 esp. J. Giladi



## LA PROBLEMO DE LA AKVO EN ISRAELO

Ni jam skribis pri tiu problemo, sed pro daŭra evoluo de la "industrio de la akvo" ni devas ripeti kaj aldoni ion al tio kion ni antaŭe skribis.

La kongreso de la "akva problemo" en Argentino inter aliaj konstatis, ke la problemo de la dolĉa akvo estas solvita por kelkcent jaroj en la tuta mondo, se ĝi uzas la metodojn, kiuj jam estas uzataj en Israelo. La kaŭzo, ke Israelo solvadas tiun problemon tiel rapide estas minaco por evoluo de la tuta Israelo. Israelo konsideras la problemon de la akvo same gravan, kiel la problemon de ŝtatdefendo.

Oni ne povas paroli pri la kvanto de la akvo, kiun la lando havas. La ĉefa afero estas, kiom da akvo ni povas eluzi por la prezo, kiu ne kaŭzos deficiton por terkulturado kaj industrio. Malmultaj estas fontoj, kiuj povas aldoni dolĉan akvon al Israelo je tiuj prezoj. Ni ne povas pligrandigi la supraĵon de la tero por terkulturado ne

pro manko de la tero, sed pro la manko de la akvo. Por tamen evoluigi la terkulturon ni devas spari la akvon.

Anstataŭ superverŝi la teron per akvo ni akvigas la teron per gutoj kontrolataj per aŭtomata komputilo, kiu donas al la vegetaĵoj sufiĉe da akvo por alĝustigi bezonatan malsekecon. La komputiloj ĉesigas la akvigon se malsekeco estas sufiĉa. Per tiu metodo ni atingas lobe pli grandan rikolton (laŭ la unuo de eluzita akvo, ne laŭ la supraĵo de la agro). Oni uzas en Israelo pli kaj pli da varibedoj ĉar la vaporiĝo tie estas trooble pli malrapida.

La aldona kaŭzo de la rapida evoluo de terkulturo estas la kvalito de la homoj, kiuj laboras en la kibucoj kaj en farmoj. Dum multaj jaroj estis kutimo, ke la homoj, kiuj pro ideologiaj kaŭzoj venis al Israelo devis labori kiel terkulturistoj; pro tio la nombro de la homoj, kiuj havis la altlernejan edukon estas pli multa ol ie ajn alie en la mondo. Ankaŭ nun multaj homoj, kiuj finis universitaton forlasis la urbon por vivi en vilaĝoj kaj ankaŭ multe pli gajnas ol kutimaj urbanoj. (Malsame estas en aliaj evoluintaj landoj, kie la plej kvalifikataj personoj laboras en komercio kaj industrio.)

La ekonomiaj premisoj, kiuj permesis krei abundon de la akvo en tiu seka lando estas:

1. La kosto de la akvo estas alta kaj altiĝas aldone, se la eluzata akvo superas la permesitan kvanton.
2. Oni ne konstruas altajn digojn por amasigi dum la vintraj pluvoj la akvon erlagoj, ĉar la vaporiĝo de la akvo estas tiel alta, ke ni perdus duonon de la kolektita akvo kaj akvo en la lagoj kaŭzos malarion en ĉi varma klimato. Anstataŭ tio ni pumpas dum la pluvo la akvon en la putojn, kie troviĝas la nature kreitaj rezervujoj de la akvo, de kie la akvo ne vaporiĝas kaj ne malpuriga.
3. Oni komencas konstrui fabrikojn por desaligode akvo. Jam en Eilat funkcias tiu instalaĵo kaj pli grandaj estas en konstruado.
4. La tuta akva sistemo estas kunligita per la tuboj, por ke ne estu loka manko de la akvo kaj la distribuo estu planita por la tuta lando.
5. Grandaj sumoj estas elspezataj por scienca esploro, kiel plej ekonomie eluzi la akvon, kiun ni bezonas, por konstrui pli efikajn desaligajn fabrikojn kaj purigajn instalaĵojn, por eviti vaporiĝon kaj alian senbezonan perdon de akvo.
6. Ni jam laboras kaj havas sukcesojn pri pligrandigo de pluvoj. Aldono da pluvoj atingas jam 10% de la naturaj pluvoj.

H. Mašler

## LISTO DE LA UNUAJ ESPERANTO-LIBROJ APEHINTAJ EN RUSLANDO

inter la jaroj 1887 kaj 1910, aprobitaj de la cara cenzuro dum la sube notitaj datoj. Tiuj ĉi datoj ne atestas pri la verkotempo de la libroj ĉar ofte la eldonota manuskripto dumlonge kuŝis ĉe la cenzoro. Okazis ke la aŭtoroj estis devigitaj longe klopoti kaj peti de la cenzoro pri lia indulgema aprobo kaj eĉ... per donaco subaĉeti lian favoron. El vidpunkto historiografia estas grave por ni scii la ĝustan daton, kiam la esp. verko estis oficiale permesita por la publika apero.

### CENZURAJ DATOJ. Ekskurso.

En Rusujo ĉiam estis cenzuro. Neniu libro, neniu gazeto, neniu folieto povis esti presata sen permeso de cenzuro. La cenzuristo subskribas manuskripton kaj sen lia subskribo neniu presejo sub severa respondeco povas komenci presadon. La cenzura permeso ĉiam devis esti presata en ĉiu libro. Pro severa cenzuro multaj esperantaj manuskriptoj, verkitaĵoj en Rusujo, estis presitaj eksterlande. Rimarko. Datoj estas laŭ malnova (juliana) kalendarstilo. En la krampoj datoj estas laŭ nova (gregoria) kalendarstilo.

9 (21) Julio 1887	Unua Esperanto libro en la rusa lingvo: 2-a eldono 31 Decembro 1887 (12 Januaro 1888); 3-a eldono 31 Julio (12 Aŭgusto) 1889
12 (24) Septembro 1887	Esperanto libro en la pola lingvo
21 Oktobro (2 Novembro) 1887	Esperanto libro en la franca lingvo
31 Decembro 1887 (12 Januaro 1888)	Esperanto libro en la germana lingvo
12 (24) Januaro 1888	2-a eldono de la unua Esperanto libro
18 (30) Januaro 1888	J. St. Esperanto libro en la angla lingvo
6 (18) Junio 1888	Dua libro; 2-a eldono 2 (14) Decembro 1892
13 (25) Oktobro 1888	Aldono al la Dua libro; 2-a eldono 9 (21) Januaro 1889
1 (13) Decembro 1888	Fuŝkin. La neĝa blovado
23 Majo (4 Junio) 1888	M.N. Dua libro en la rusa lingvo
23 Majo (4 Junio) 1888	Hanez. Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea. 1888
23 Majo (4 Junio) 1888	Hanez. Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea-germana. 1888
28 Decembro 1888 (9 Januaro 1889)	Plena vortaro rusa-internacia; 2-a eldono 7 (19) Septembro 1893; 3-a eldono 6 (18) Majo 1899
5 (17) Januaro 1889	Geoghegan. Esperanto libro en la angla lingvo
9 (21) Januaro 1889	Mani. Vortaro por hispanoj
9 (21) Januaro 1889	2-a eldono de la Aldono al la Dua libro
9 (21) Januaro 1889	M.N. Aldono al la Dua libro en la rusa lingvo
9 (21) Januaro 1889	Goethe. La gefratoj
30 Januaro (11 Februaro) 1889	Vortaro Internacia-germana
20 Marto (4 Aprilo) 1889	Libeks. Esperanto libro en la latva lingvo
2 (14) Julio 1889	Antaŭparolo al la vortaro de la lingvo "Esperanto"
31 Julio (12 Aŭgusto) 1889	2-a eldono de la unua Esperanto libro
13 (25) Aŭgusto 1889	Lermontov. Princino Mary
18 (30) Septembro 1889	1-a Adresaro de la esperantistoj
1 (13) Marto 1890	David Gurevič. Hebrea mallonga vortaro kun lerno-libro de internacia lingvo
29 Julio (10 Aŭgusto) 1890	Vsemirnij Jazik "Esperanto". Polnĵj učebnik
24 Marto (5 Aprilo) 1892	Societo "Espero" en S. Peterburgo
29 Aprilo (11 Majo) 1892	Regularo de la societo "Espero"; 2-a eldono 15 (27) Novembro 1895.
15 (27) Julio 1892	"Esperanto". Meĵunarodnĵj Jazik. Predislavlje i polnĵj učebnik

- 2 (14) Decembro 1892  
 8 (20) Decembro 1892  
 30 Junio (12 Julio) 1893
- 29 Julio (10 aŭgusto) 1893
- 5 (17) Oktobro 1893  
 5 (17) Oktobro 1893  
 8 (20) Decembro 1894  
 8 (20) Decembro 1894
- 10 (22) Januaro 1895  
 21 Marto (2 Aprilo) 1895
- 4 (16) Septembro 1895
- 7 (19) Septembro 1895  
 18 (30) Oktobro 1895
- 31 Oktobro (12 Novembro) 1895  
 15 (27) Novembro 1895  
 14 (26) Decembro 1895  
 7 (19) Februaro 1897  
 2 (14) Marto 1897  
 2 (14) Marto 1897  
 7 (19) Aprilo 1897  
 24 Julio (5 aŭgusto) 1897  
 27 Januaro (8 Februaro) 1898
- 24 Februaro (8 Marto) 1898  
 25 Februaro (9 Marto) 1898
- 3 (15) Majo 1899  
 3 (15) Majo 1899
- 3 (15) Majo 1899  
 3 (15) Majo 1899  
 29 Januaro (11 Februaro) 1901  
 17 (30) Aprilo 1901  
 10 (23) Februaro 1904
- 11 (24) Majo 1904
- 12 (25) Junio 1904  
 12 (25) Junio 1904  
 22 Novembro (5 Decembro) 1904
- 28 Aprilo (11 Majo) 1905  
 8 (21) Novembro 1905  
 15 (28) Novembro 1905  
 18 (31) Decembro 1909
- 2-a eldono de la Dua Libro  
 Beaufront. Langue internationale Esperanto  
 Universala vortaro de la lingvo internacia Esperanto; 2-a eldono 24 Februaro (8 Marto) 1898;  
 3-a eldono 3 (15) Majo 1899; 4-a eldono 17 (30) Aprilo 1901; 5-a eldono 12 (25) Junio 1904  
 Ekzercaro de la lingvo internacia Esperanto; 2-a eldono 24 Julio (5 aŭgusto) 1897; 3-a eldono 3 (15) Majo 1899; 4-a eldono 12 (25) Junio 1904  
 Granda germana-esperanta vortaro  
 Lermonroy. Demono  
 Puŝkin. Stona gasto  
 Meĵunarodnĵaj Jazik "Esperanto. Polnĵaj ŭbeŝnik"  
 predislodĵem i dvunĵaj slovarĵajni; 2-a eldono 27 Januaro (8 Februaro) 1898  
 Korolenko. Fantomoj  
 Traduko de la Ekzercaro en la franca lingvoj; 2-a eldono 3 (15) Majo 1899  
 Kratkĵija svedenĵija o meĵunarodnom jazike "Esperanto"; 2-a eldono 25 Februaro (9 Marto) 1898; 3-a eldono 3 (15) Majo 1899  
 2-a eldono de la Plena vortaro rusa-internacia Beaufront. Petite brochure sur la langue internationale "Esperanto"  
 16-a Adresaro de la esperantistoj  
 2-a eldono de la Regularo de la societo "Espero" Naŝliewski. O jazyku miĵzynarodowym Esperanto  
 Vibor meĵunarodnago Jazika  
 Wahl einer internationalen Sprache  
 Choix d'une universelle langue  
 The selection of an international language  
 2-a eldono de la Ekzercaro  
 2-a eldono de la Meĵunarodnĵaj Jazik Esperanto. Polnĵaj ŭbeŝnik  
 2-a eldono de la Universala vortaro  
 2-a eldono de la Kratkĵija svedenĵija o meĵunarodnoma jazike "Esperanto"  
 3-a eldono de la Universala vortaro  
 2-a eldono de la traduko de la Ekzercaro en la franca lingvo  
 3-a eldono de la Kratkĵija svedenĵija o meĵunarodnoma jazike "Esperanto"  
 3-a eldono de la Ekzercaro  
 3-a eldono de la Plena vortaro rusa-internacia Como sum. Gillelizm  
 4-a eldono de la Universala vortaro  
 Sranĵitelnaĵa rusko-polsko-francuzsko-nĵemeckaja frazeologĵija. Unua kajero  
 I. Ostrowskiĵ ricevis permeson eldoni gazeton "Esperanto", unuan esperantan gazeton en Rusujo  
 4-a eldono de la Ekzercaro  
 5-a eldono de la Universala vortaro  
 Sranĵitelnaĵa rusko-polsko-francuzsko-nĵemeckaja frazeologĵija. Dua kajero  
 Proverbaro Esperanta. Unua kajero  
 Proverbaro Esperanta. Dua kajero  
 N. N. Devĵatnina. Plena vortaro. Dua libro  
 Regularo de kovna Esperantista Societo  
 Adolf Holzhaus

## AKO - LEGENDO KAJ HISTORIO

Jinon Meiri

Dum matenlumo de mitologio, kiam dioj estis edriĝantaj kaj naskantaj, la duon-dio Herkulo mortigis sian familion. Kiel puno li devis plenumi dek ĉu neplenumeblajn taskojn en ĉiuj anguloj de la terglobo. Post unu el ili li malsanigis kaj la orakolo sendis lin al la rivero-dio Belos, kiu donis al li medikament-herbon. Danke li konstruis urbon kaj nomis ĝin Aka (greklingve- medikamento).

Juda legendo klarigas la nomon alie: kiam la Eternulo kolektis la akvon en unu lokon, tio ne plaĉis al la akvo kaj ĝi volis rekapti forprenitajn teritoriojn. Do la Eternulo metis grandan rokon kaj diris al la akvo: "Ĝis ĉi tie", (hebree: "Ad ko") vi venos kaj tial la loko nomiĝas Aka.

Ako estas havenurbo, dek kvin km norde de Hajfo, unu km. norde de la rivereto Naaman (Belos). La nomo aperas unue en la 19-a jarcento a.K. en la egiptaj malbenskribaĵoj (antikva metodo de nekonvencia milito). Poste ĝi aperas en la 12-a jarcento a.K. en la Tel-Amarna-leteroj. En tiu epoko, laŭ la legendoj feniciaj maristoj, kiuj kuiris siajn manĝaĵojn ĉe la marbordo apud Belos, inventis vitron. Aliaj Fenicioj eltrovis, ke oni povas farbi vestaĵojn purpure per la marlimakoj de Aka, kaj la urbo fariĝis industria centro.

La Israelidoj eniris la landon kaj Ako estis promesita al la tribo Aŝer, sed ĝi ne sukcesis okupi ĝin.

La reĝo David okupis la ĉirkaŭajn vilaĝojn, sed lia filo Salomono donacis ilin al la fenicia reĝo Hiram el Tiro (Cor). De tiam la urbo ne estis sub israela regado ĝis nia jarcento, kvenkiam judaj komunumoj vivis tie kaj la judaj maristoj de kiuj estis famaj.

En la jaro 332 a.K. okupis ĝin Aleksandro la Granda, En 71 a.K. okupis ĝin Pompeo kaj uzis ĝin kiel centran havenon por invadi Israelon. Pasis jaroj. Kiam la Bizancoj okupis Israelon, Ako estis nomita Ptolomais kaj fariĝis episkopeja urbo. En la jaro 636 Araboj okupis la urbon kaj redonis al ĝi la nomon Aka. La rivero Belos nomiĝis Naaman, kiu signifas arabe "certe jes" kaj laŭ araba legendo ĝi ricevis la nomon, kiam ĝi permesis al la profeto Mohamedo trapasi ĝin.

La kruckavaliroj provis okupi Akon kaj sukcesis ĝin fari la Jerusalema reĝo Baldwin la Unua en 1104. Post kvindek jaroj Ako fariĝis unu el la plej grandaj urboj de la Mediteraneo. Ĝia nomo estis tiam Sankta Johano de Akro.

En 1187 Araboj reokupis ĝin, sed en 1191 Rikardo Leonkoro reprenis ĝin por la kristanoj. En 1291 falis la kruckavalira ŝtato kaj Akon okupis Mamelukoj. Por malebligi al la kruckavaliroj reveni, ili detruis la urbon kaj ĝi fariĝis vilaĝeto. En 1517 ĝi denove estis urbo. Ahmed Al Ĝazar konstruis tie belegan moskeon (la ŝtonojn li alportis de la ruinoj de Cezareo kaj Aŝklon) kaj ĉar la akvo en Ako estis malbona, li konstruis akvedukton de Kabri al Ako. Kiam Napo-

leono Bonaparte venis al Israelo, Ĝazar sukcese defendis Akon helpe de sia juda financministro, Haim Farhi. Kiel "ĉankon" Ĝazar ordonis elkavigi la okulon de Farhi kaj fortranĉi lian nazon kaj orelon. La akvedukto staras ĝis nun kaj estis uzata ĝis 1947.

En la dekaŭa jarcento la haveno fariĝis tro malpro-funda por la modernaj ŝipoj kaj Hajfo fariĝis la ĉefa haveno. En tiu jarcento oni ekziligis al Ako Baha-Alla'n, la kreintan de Bahaismo. Lia tombo apud Ako estas nun centro de la Bahaanoj.

En 1917 Britio okupis Israelon. Ako ne estis grava urbo, sed ĝi estis regiona prizono en kiu oni pendigis judajn liberecbatalantojn.

La 17.5.1948 Israela Defendarmeo konkeris Akon. Hodiaŭ ĝi estas malgranda industria urbo, en kiu judoj kaj Araboj loĝas kune pace kaj tolereme. Ĝi estas ankaŭ turisma urbo pro sia bela marbordo kaj antikvaĵoj. Indas vidi tie Citadelon, kie iam estis angla prizono. Hodiaŭ tie estas hospitalo, sed en la prizona mortigejo estas muzeo de liberigilito. La Citadelo estas konstruita en la 18-a jarcento sur la kruckavalira konstruaĵo, kiun oni povas viziti. Ĝi estas la manĝosalono de la ordeno de Templanoj (erare nomita kriptoj). De ĝi eliras tunelo, kiun oni ne finis malkovri, sed ĝi verŝajne atingas la muregon de la urbo. Apud la Citadelo estas la vaporbanejo, en kiu nun estas muzeo de arto kaj folkloro.

Aliaj vidindaĵoj: La moskeo de Ĝazar, la kvar "Ĥan'oj" (gastejoj), el kiuj la plej bela estas Ĥan el Umdan (gastejo de pilleroj). En la haveno estas ruinoj de lumturo, kiun la kruckavaliroj nomis "Turo de la muŝoj".

Apud Ako oni povas viziti la tombon de Baha-Alla, la akvedukton kaj muzeon de la genocido en kibuco "Loĥamej Ĥaĝetaot".

#### DIRAĴOJ PRUDENTAJ KAJ MALPLEI PRUDENTAJ

Ĉiu persono havas 3 diversajn karakterojn: tiun, kiun li manifestas, tiun kiun li opinias posedi - kaj lian veran karakteron.

Eĉ malsaĝulo, se li silentas, estas rigardata kiel saĝulo. (L.I.Z.)

Iru al la formiko, vi maldiligentulo; rigardu ĝian agadon kaj saĝiĝu.  
(La sentencoj de Salomono, 6)

Pli bona estas plendo, ol ridi: ĉar ĉe malĝojo de la vizaĝo pliboniĝas la koro (La Predikanto, 7)

Tiu, kiu pensas, ke li povas ekzisti sen la mondo ĉirkaŭanta lin, trompas sin. Tiu, kiu pensas, ke la mondo ne povas ekzisti sen li, trompas sin pli. (Deŭriĝo-p. 24.)

#### LEOPOLD STAFF (1878-1957)

Leopold Staff en la komenco de sia literatura vojo estis kiel poeto influita de la simbolisma skolo. Poste li aliĝis al la adeptoj de la "klasika" linio, - al la poetoj, anoj de la influforta grupo "Skamandro" (laŭ la nomo de rivero prikantita de Homero), fluinta ĉe Trojo). Al tiu ĉi poeta anaro apartenis ankaŭ J. Tuvim, A. Sĥonimski k.a. Dum hitlera okupo de Polio, ĉiuj skamandranoj akceptis antifaŝistan pozicion. La sekvonta versaĵo respegulas la nazian konduton.

#### DETURO DE CHOPIN-MONUMENTO EN VARSOVIO

Esprimis Vinne bronzo sed aer' leĝera,  
Tremanta per la sonoj de muzik' mistera,  
Kunplektaĝanta kronojn de la man' anĝela  
Kaj forfluganta supren al spaco ĉiela.

Vin, kiu jam estas ekster globorbuto,  
Ne tiranas, kiel min, monda malnobleco.  
Vi konis sur altaĵo de Via spirito  
Pli teraran turmenton de Via dieco.

Modestan Vian bronzon kovris tia ĝloro,  
Ke apenaŭ kuragiĝis tuŝi ĝin Aŭroro  
Per rozkoloraj fingroj de sia ekbrulo.  
Tamen Vian majeston man' de aŭdeculo

Senhonrigis. Sbiro pro rabio blinda  
Frakasis monumenton (ĉefverko mirinda!)  
Atencinton perdigis ordon' antaŭmorta:  
"Mian koron trapiku per la bato forta".

Via lasta postulo estu plenumita,  
Ĉar Via koro estas Via ter' merita,  
Kiun oni traboris. Vi restadas viva,  
Ĝis nun ne sepultita, ĉiam efektiva.

Dum tondroj kaj tempesto en abism' tenebra  
Sonas Via senmorta Granda Marŝ Funebra.


El la pola: Irena Missiuo.

ANGULO DE JELI

RIDETANTA VORTARO (parto II.)

Amuzo: Utiligo de amo.  
 Bombo: Unu dividite per bombo.  
 Eraro: Grupo konsistanta el kelkaj partoj.  
 Informo: Bela aspekto (Generale...)  
 Insekto: Feminista kredanta organizo.  
 Inverso: Ne porvira poeziaĵo.  
 Katalogo: Muso.  
 Kateno: Internaj organoj de la kato.  
 Komparo: Citilo.  
 Konstato: Difino de interhoma rilato.  
 Kostumo: Prezo.  
 Kredito: Dio.  
 Kvarantena: Havanta kvar antenojn.  
 Literaturo: 28 etaĝa konstruo.  
 Marmoro: Generala vivmaniero kaj kutima konduto de ŝipistoj.  
 Mistero: Fuŝo de paraŝutisto.  
 Partero: Duopa bieno.  
 Profilo: Ofta kaŭzo al gepatra kverelo.  
 Persono: Parole, kante k.s.  
 Rabato: Alies apartenaĵo forprenata perforte.  
 Spirito: Aero.  
 Teamo: Ĝina tradicio.  
 Tereno: Interno de la tero.  
 Teroro: Nafto.  
 Turisto: Profesiulo pri turoj, - okupiĝanta pri fakturoj.  
 Veneno: Emirejo.  
 Vintro: Ebrio.

Josef Šemer



AMUZAĴOJ, KAPROMPILOJ KAJ ARTIFIKOJ.

Trovu du diversajn nombrojn "x" kaj "y", tiel ke  $x$  plus  $y = x - \text{oble } y$ .

La nombroj estas realaj kaj pozitivaj.  
 Inter la solvintoj de tiu problemo estas lotita libro el la esperanta literaturo donacita de s-ano Natan Heller.

La ĉasisto iris 10 km suden, poste dek km okcidenten, ĉasis tie la urson kaj iris 10 km norden. Tiam li rimarkis, ke li troviĝas en la sama loko de kiu li eliris (matene).  
 Kian koloron havis la felo de la urso?

Respondojn esperantlingve bonvolu sendi al la redakcio.

KRUCVORTENIGMO N<sup>o</sup> 1

1	2	3	4	5	6
7	8	9			10
11		12		13	14
15			16		
17		18	19		20
	22			23	24
	25				

Vertikale: 1. Procentaĵo, pago al makleristo.  
 2. Membro de la familio. 3. Mallongigo de telefono.  
 4. Flava metalo. 5. Necivilizita homo. 6. Ina pronomo.  
 8. Restaĵo el disfalinata konstruo. 10. Vojo inter konstruaĵoj. 12. Universala Insekta Movado. 14. Nedifina pronomo. 16. Prefikso. 19. Landa asocio aliĝinta al UEA.  
 21. Rimedo por pago. 22. Populara trinkaĵo. 24. Prepozicio, la malo de "el".

Horizontale: 2. Monato de la jaro. 7. Granda vazo, kiun antikvaĵoj uzis por ĉerpi akvon. 9. Difinita epoko, de kiam oni komencas la kalkulado de la jaroj. 10. Resenda pronomo de la tria persono. 11. Kolombani. 13. Deviga religia ceremoniaro. 15. Arbo, kies florojn oni uzas por fari kvietigajn infuzojn. 16. Blanka kaj malmola substanco, el kiu konsistas la dentegoj de la elefanto. 17. Membro. 18. Sankta urbo por Mahometanoj (arabe). 20. La plej mal-simpattia sufikso. 23. Tre facile vaporiganta fluidaĵo (inverse). 25. Monarkino.

Sendu viajn solvojn al p.k. 22041, T-A. Inter la solvintoj estos lotumita premio. La solvoĵaj aperos en la venonta numero.



### KLUBAJ VESPEROJ

Vinograd: Lumbildoj pri Brazilio  
 Perlman: La plej gravaj eventoj en la jaro 1976  
 Ron: Pri USONO

Amika interparolado

Landa konferenco

Mašler: La lastaj eventoj en Esperantio. (Leŭ la lasta numero de "Heroldo").

Vinograd: Lumbildoj de USONO

Perlman: 300 jaroj post la morto de Spinoza

Mašler: Novajoj de Esperanta mondo

Giladi: Miaj korespondamiko

Perlman: 150 jaroj post la morto de Beethoven (kun muzika akompano).

Pystynen: (Finnlando): Miaj hobiaj: Esperanto kaj kouturnoj.

Ron: Pri desegnado kaj pentrado.

Kohen Cedek: El siaj versafoj.


### NIAJ GASTOJ

Günther Peek kaj edzino - Germanio

Orenstein Fauba - Rumanio

Raimo Pystynen - Finnlando

Ramie Ditlof Tjassens Lips - Nederlando



### JUNULARA DELEGACIO AL FRG. KAJ AL LA KONGRESO

La tutjaraj klopodoj de s-ano Amri Vandel finiĝis per plena sukceso. Amri estis en Kontakto kun GEJ (Germ. Esp. Jun.) kaj sukcesis ricevi subtenon de la germana registaro por interŝanĝo de esp. junularo inter Israelo kaj Germanio. Samtempe li tre sukcesis ricevi libereigon de impostoj por la veturantaĵaĵoj. La prialkulita nombro de la seĝumuloj, kiuj intencis veturi estis 10, sed la insistaj petoj, ke estu akceptitaj aldonaĵaĵoj kaj la knuzis, ke la nombro de la forveturantoj estas fine 15. La plano de la ekskurso estas tre interesa. Ĝi enhavas vizitojn en pluraj esp. centroj en Okcidenta Germanio, ĉe-esto en Grésillon kaj partopreno en Internacia Junulara Kongreso en Poitiers, (Francio). Interesa estas fakte, ke inter la enskribintoj estas kelkaj, kiuj ankoraŭ ne finis la kurson por la komencantoj, sed tre intense lernas por ĝui tiun entreprenon. Estas inter ili ankaŭ 14-jaruloj.

### S C I I G O J

Arabaj lernolibroj kaj vortaroj estas ricevitaj de d-ro Issak Nassif. La lernolibroj estas aĉeteblaj ĉe d-ro Mašler, T-A. Hapardes ll. prezo-20 ll por ambaŭ.

Hispana Socialista Laborista partio rezoluciis dum sia kongreso en Madrido en Okt. 1976: "Por progresigi interkomprenon kaj fratecon inter la laboristoj, necesas por li senpera komunikado. Pro tio estas dezirinde por ĉiuj socialistaj partioj en la mondo adopti E-on por la internaciaj rilatoj de la laborsita klaso".

Tranokteblecoj je moderaj prezoj en Tel Avivo ĉe ges-roj M. J. Hamer, str. Hameleŭ ĝorĝ 68. Bonvolu kontakti antaŭe skribe al la sama adreso aŭ telefone (03)281759.

La estraro de ITALIA ESPERANTO-FEDERACIO decidis eksperimenti en Kampobaso novspecan kongreson, kiu malsimilu la kutiman Esp.-foiron. La kongresanoj dividiĝos je diversaj grupoj: Akompanantinoj, komencantoj, duonkomencantoj (eventuale eternaj), movadaj agantoj kun teoriaj interesoj aŭ kun praktikaj intereso, junuloj ĝis 20 jaroj, alinstruigata por ĉiu grupo. Estos ankaŭ kursoj por tiuj kiuj volos lerni, seminario por movadaj agantoj. La tuto estos plejparte amuziga sed serioza. Kampobaso klopodos eksperimenti la seminarian vojon.

La kongreso okazos de la 3-a ĝis la deka de Sept. 1977.

Fine la kongreso devas havi karakteron de la mediteranea kongreso kiel regiona kongreso por Italioj, Jugoslavo, Hispanoj, Grekoj, Maltanoj, Araboj kaj Israelanoj.

Pluaj detaloj: Renato Corsetti, Via Strabone 1, 00176 Roma, Italio.



### KURSOJ

En la Junulara domo en Tel Avivo daŭras du kursoj, kiujn gvidas de la komenco en Februaro d-ro Mašler kaj J. Murĵan. Ambaŭ kursoj havas plurajn lernantojn. La fina eksameno havos lokon meze de Julio.

La kurso por la progresantoj pli grandigis, gvidas ĝin samaj instruantoj. La kurso havas lokon ĉiuĵaŭde en klubejo.

### BIBLIOTEKO

Leŭ la decido de C.K. plialtiĝas la sumo de la kaŭcio por libro de la biblioteko kaj estos 20 ll.

La tempo, dum kiu oni rajtas teni libron estas 2 monatoj. Por ĉiu aldona samideanoj devas alpagi po unu ll.

### J. KOHEN CEDEK REE PREMIITA

En la 3-a literaturkonkurso de "Iarius" en Como, Italio, la 3-an premion por sia originala poeziaĵo s.t. "Je gloro de miaj amataj" ricevis nia s-ano J. Kohen Cedek. Sincerajn gratulojn sendas ELI kaj JELI.

### KELKKOLORA PROPAGANDILO

Baldaŭ aperos kelkkolora propagandkarto, hebrelingva, desegnita de la grafikistino f-ino Jehudit Epštajn. Uzu ĝin por propagandi nian lingvon inter amikoj, en via laborloko, en lernejoj k.t.p. La prezo-50 ag. por 20 kartoj-7.50! Mendebla ĉe J. Giladi, str. Ĉerniĥovski 94, Kfar Saba.

### Aperis

Nova praktika vortaro HEBREA-ESPERANTA de J. Murĵan. 160 paĝoj duoblaj. Pli ol naŭ mil hebreaj vortoj. Prezo-18 IL. (ne inkluzivas afrankon). Havebla ĉe J.M., p.k. 1289, Tel Aviv.

Responde je pluraj demandoj mi informas, ke estas preparata eldono de plena vortaro Esperanto-Hebrea. Restis ankoraŭ multe da laboro kaj ĉiuj volontuloj por helpi en diversaj funkcioj estas bonvenaj. (La laboro estas farata sen komercaj celoj; la sola celo estas disvastigi Esp. en nia lando.) La helpantoj ne bezonas perfektan scion de iu el ambaŭ lingvoj.

J. M.

### D O N A C O J

Rotenberg Jaakov (pere de d-ro Mašler) 65 IL  
Jaakov Ievi 100 IL  
A. Holzhaus (USONO 1973) 130 IL

### G R A T U L O J

ELI kaj JELI gratulas kaj deziras multe da feliĉo kaj goĵo al Anat Zajdman kaj ŝia edzo pro la nasko de ilia dua filo.

### JARKONFERENCO

Kiel kutime, la jarkonferenco okazis dum la pastaj festotagoj. Ĉi jare la konferenco partoprenis 120 s-anoj. La etoso estis tre gaja, speciale sukcesis koncerto, kiun organizis tre bone s-amino Wunderbaum. Estis elektita la sama estraro. S-ano A. Manor restis prezidanto de ELI.

### EN RADIO KAJ GAZETARO

En la israela radio estas programo s.t. "Venu paroli". Eluzis ĝin s-anoj Gadi Meir kaj Josi Semer por telefone rakonti pri nia lingvo kaj agado. La intervjuanto instigis ilin sufiĉe detale rakonti pri ĝi. La intervjuo daŭris 10 minutojn.

o o o o o o o

D-ro H. Mašler estas invitita al radio en la programon "Personaj demandoj", kie li estis intervjuata 50 minutojn pri sia vivo. La intervjuanto s-ro Agmon, la plej konata en la lando pro siaj akraj intervjuoj, permesis al li eluzi preskaŭ tutan tempon por rakonti, kiel li esperantistigis, kial li daŭre laboras por tiu ideo. La intervjuo estis subendiĝita kaj disaŭdigota en la fino de Julio aŭ en komenco de Aŭgusto. La disaŭdigo okazos sabate je la horo 13.05. Oni povas trovi en la ĵurnaloj precizan daton en "Galej Cahal."

o o o o o o o

En la ĵunulara gazeto "Maariv Lanoar" aperis detala sciigo pri la esp. ĵunulara intersango inter Israelo kaj Okc. Germanio.

o o o o o o o

### Plibonigo de eraroj

En la numero 57-a de IE sur la paĝo 8-a, en versaĵo "Kie", a linio, la vorto "Reino" devas esti skribita Rejno. En la dua strofo mankas unu linio. devas esti:

"Ĉu per sablo, mi kovrita

Kuŝos apud acean'

Aŭ, malzorge enigita

En dezert' - per fremda man'?"

### ĜOIGA ŜANĜO

En Israelo kaj versaĵe en granda parto de la mondo la s-anoj alkutimigis, ke per penado, propagando, personaj influoj, oni povas antaŭenigi nian movadon. Ili uzas sian kapablecon, personajn influojn por atingi kurson, intervjuon en ĵurnalo, radio k.t.p. En la lasta tempo en Tel Avivo oni povas rimarki la unuajn signojn de la ŝanĝo de sinteno de ne esperantistoj al nia lingvo kaj movado.

D-ro H. Mašler estis invitata al la kultura sekcio de urbestro, sen iu ajn peno de lia flanko. Tie li estis petata en autuno komenci kurson por la "Popola

Universitato". La kurso devas daŭri tutan jaron kaj estos pagata de urbestro. D-ro M. akceptis la inviton.

Da semajnojn poste turnis sin direktoro de gimnazio en Holon al d-ro M. kun peto instrui E-on kiel devigan duan fremdan lingvon en sia lernejo. D-ro M. jam pro sia trookupo ne scipovis akcepti la proponon, sed proponis al s-ano A. Ron akcepti tiun inviton. S-ano Ron promesis akcepti ĝin kaj kontaktiĝis kun la direktoro telefone. La rezultojn ni vidis post la somera libertempo. Ankaŭ tiu instruado estos pagata de la gimnazio.

La invito venis al d-ro M. sen iu ajn instigo de niaj samideanoj. Se la afero daŭre tiel antaŭenmarŝos, nia movado ekstaros antaŭ la problemo kiel trovi sufiĉe da instruistoj por nia lingvo...

#### VOLAS KORESPONDI

Santiago Mulas Callejo, Alfonso I, 13-1. Izqda, GIJON, (ASTURIAS) Espana, pri iu ajn temo.

S-ro Fabio Vivoda, Via XXV Aprile, 4, 1-34074 Monfalcone-go Italio, 40 jara, edziĝinta, havas 15 j. filon, ŝatas fremdajn lingvojn. Leĝnas hebreajn lingvon.

L. Fdo. Martinez S. Medelin-1 Kolombio, P.O. Kesto 6950.

Leonard Szucko, Box 1500 M.S. 38617-5-U, El Reno, Okla 73036, U.S.A. 24-jara, desegnistino, interesiĝas pri oceano-grafio kaj aeronautiko.

Yosifumi Okano, S-ro, 41-jara, poŝtoficeisto, kolektas poŝtmarkojn kaj malkarajn monerojn.  
Okuradani Aza Simizu 638-200, Akasi Hyogoken 673, Japan.

Maria Ernőné Kiss, H-5900, Oroshaza. Makov u.21 Hungario. 47-jara virino, edziĝinta +2 gefiloj (16, 13 jaraĵ), kolektas kolorajn bildkartojn, ŝatas korespondi, interesiĝas pri ĉiu temo.

Maŝinĝenero Jan Šafr, 34 jara, pri socialisma movado, ve Střešovičách 5, 169 00 Praha 6. Střešovice, Ĉeĥoslov.

#### Daŭrigo de la p. 2: "La naŭdeka jubileo.."

La demando pri lingvo internacia okupadis min jam longe; sed sentante min nek pli talenta, nek pli energia, ol la aŭtoroj de ĉiuj senfrukte pereintaj provoj, mi longan temon limigadis min nur per revado kaj nevola meditado super tiu ĉi afero. Sed kelke da feliĉaj ideoj, kiuj aperis kiel frukto de tiu ĉi nevola meditado, kuragiĝis min por plua laborado kaj igis min ekprovi, ĉu ne prosperos al mi sisteme venki ĉiujn barojn por la kreo kaj enkonduko en uzadon de racia Lingvo Internacia.

Ŝajnis al mi, ke tiu ĉi afero iom prosperis al mi kaj tiun ĉi frukton de la longtempaj persistaj laboroj mi proponas nun al la prijuĝo de la leganta mondo".

Tiuj ĉi enkondukaj vortoj karakterizas la noblan karakteron, altruismon kaj modeston de la genia kreinto de la Internacia Lingvo. Li traktis sin mem ne pli kapabla ol ĉiuj aliaj, kiuj faris senfruktajn provojn kaj opiniis, ke li nur "iom pli prosperis" ol aliaj.

Sed la plej nobla decido de d-ro Z, kiu speguligas lian honestecon kaj ankaŭ ludis grandan rolon en la venko de Esperanto estis lia tuja rezigno de ĉiuj specialaj rajtoj kaj pretendoj, pri siaj meritoj koncerne de la Internacia Lingvo. Li ne pretendis kaj postulis nenion por sia genia kreaĵo.

Aleksander Manor

#### Daŭrigo de la paĝo 15. "Diraĵoj..."

Kiu faras eraron kaj ne korektas ĝin - reeraras.

Peko kaj eraro estas ecoj de l' homaro. (L.I.Z.)

Sperto ne estas tio, kio okazas al vi, sed tio, kion vi faras, kiam ĝi okazas.

Kio estas laboro? vojo malfacila kaj malkomforta por akiri monon.

Antaŭ ol peti mondonon de amiko, decidu kio estas por vi pli grava: la mono aŭ la amikeco.

Virino parolanta kun viro - monologo; virino parolanta kun virino - katalogo.

Por edziniĝi belan virinon kaj bonan kuirantinon vi devas esti bigamiulo.

Infaneco - mirinda aĝo, kiam por malpliigi la pezon, sufiĉas nur sin lavi.

EN H A V O

- |   |                               |     |
|---|-------------------------------|-----|
| La naŭdeka jubileo de Esperanto             | - A. Manor                    | 2.  |
| Esperanto naŭdekjara                        | - I. Levin                    | 3.  |
| J. Kohen Cedek - "Eminentulo de Jerusalemo" | trad. J. Kohen Cedek          | 5.  |
| Psalmo                                      | "                             | 6.  |
| La himno de Israelo                         | - J. Kohen Cedek              | 7.  |
| Efraim Kiŝon                                | - A. M.                       | 8.  |
| La mondrekordo pri stulteco                 | - E. Kiŝon (trad. G. Ziegler) | 10. |
| Amkanto                                     | - D. Minusi (trad. J. Giladi) | 10. |
| Problemo de la akvo en Israelo              | - H. Maŝler                   | 10. |
| Listo de la unuaj Esp. libroj               | - A. Holzhaus                 | 12. |
| Ako - legendo kaj historio                  | - J. Meiri                    | 14. |
| Diraĵoj prudentaj kaj malpli prudentaj      |                               | 15. |
| Leopold Staff                               |                               | 16. |
| Detruo de Chopin-Monumento en Varsovio      | - J. Staff (esp. I. Missiuro) | 16. |
| Angulo de JELI                              |                               |     |
| Ridetanta vortaro                           | - J. Šemer                    | 17. |
| Amuzaĵoj                                    |                               | 17. |
| Krucvorteniĝo                               | - J. Š.                       | 18. |
| Klubaj vesperoj                             |                               | 19. |
| Delegacio al Germanio                       |                               | 19. |
| Sciigoj                                     |                               | 20. |
| Korespondpetoj                              |                               | 23. |

